

# NSiR - Nova Sento in Rete



**N. 0964**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet <http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet <http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Luigi Fraccaroli [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

## Indice articoli

<b>Giorgio Silfer è stato candidato al premio Nobel per la letteratura dal PEN Esperanto</b> .....	1
<b>Iniziativa Gruppo Esperantista Grossetano “La Grifo”</b> .....	2
<b>Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto, IIK, Lisbono 2018 [Piccolo congresso per bambini e ragazzi, Lisbona 2018]</b> .....	3
<b>Plursporta Mara Ferio 2018 [Vacanze estive multisport 2018]</b> .....	4
<b>Staĝo pri tradukado ĉe KCE [Stage sulla traduzione presso il Centro Culturale Esperantista di La-Chaux-de-Fonds</b> .....	5
<b>Agado de UEA dum 2017 [Attività dell’Associazione Esperantista Mondiale nel 2017]</b> .....	6
<b>Pillole di Salvezza 0964: Miramar</b> .....	19

# Giorgio Silfer è stato candidato al premio Nobel per la letteratura dal PEN Esperanto

**Giorgio Silfer** è stato candidato al **premio Nobel** per la letteratura dal PEN Esperanto. Un italiano candidato al Nobel per la sua produzione in esperanto, mai successo!

**Giorgio Silfer** estis kandidato je la **Nobel-premio** pri literaturo fare de PEN Esperanto. Italo kandidato al la premio pro lia produktaĵo en Esperanto, neniam okazis antaŭe!

Giorgio Silfer, pseudonimo di Valerio Ari (Milano, 1949), è uno scrittore ed esperantista italiano naturalizzato svizzero.

È dottore in lingue (1982) e lettere moderne (1987); insegnante (anche universitario dal 2001), consulente organizzativo, scrittore e pubblicista. Cultore della materia per interlinguistica ed esperantologia presso l'Università di Torino.

Giorgio SILFER (naskiĝis en 1949 en Milano, Italio) estas pseŭdonimo de Valerio ARI, doktoro pri modernaj lingvoj (1982) kaj beletristiko (1987). Li estas lingvoinstruisto, organiza konsilisto, verkisto kaj publicisto.




# Iniziativa Gruppo Esperantista Grossetano "La Grifo"

Il Gruppo Esperantista Grossetano "La Grifo", in collaborazione con alcune associazioni del comune di Scansano ("Auser", "Caritas", "Tante Quante", "Macramè"), il Comune stesso e la casa editrice "Innocenti" di Grosseto, organizza, nell'ambito del ciclo di incontri denominato "**Il Tè del venerdì**", che si tengono presso la locale biblioteca comunale "Aldo Busatti" (posta in Via Armando Diaz 5) una iniziativa culturale.

Tale incontro, che si terrà a partire dalle ore 17 di venerdì 20 aprile, avrà per argomenti la presentazione di due libri, in italiano ed Esperanto, opera del socio Pier Vittorio Orlandini, nonché la presentazione della lingua Esperanto stessa. I volumi in questione sono:

"Aldo Busatti. Cinque racconti - Kvin rakontoj", (di cui è recentemente uscita la versione "audiolibro" a cura del Gruppo Esperantista Mantovano) che riporta cinque interessanti racconti, estratti dalla raccolta "La mia Maremma" di Aldo Busatti (professore, preside e letterato originario di Scansano, da cui la dedicazione della biblioteca);



"Un nuovo sguardo alla Provincia di Grosseto - Plia rigardo pri la Grosseto-provinco" che riporta, in una lussuosa ed illustratissima edizione, nella prima parte varie descrizioni di luoghi, ambienti, monumenti della provincia grossetana, partendo da Scansano (luogo di origine anche dell'Orlandini), nella seconda varie opere letterarie di autori maremmani e/o legati al territorio (Carducci, Cardarelli, Fucini, Luzi, Bianciardi...).

Condurrà l'incontro la professoressa Renata Caprini Ginesi, autrice tra l'altro di varie pubblicazioni ("L'impronta di un grande amore", "L'assenza", "Materna Terra Mia. Scansano le radici del nostro presente") ed ideatrice degli incontri culturali, ed intervengono Stefano Innocenti (editore), Giovanni Zanaboni (Presidente GEG) e Laura Brazzabeni (Vice-Presidente FEI).

# Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto, IIK, Lisbono 2018 [Piccolo congresso per bambini e ragazzi, Lisbona 2018]

Dum Lisbona UK okazos Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto, [IIK](#).

Aliĝis 20 [knaboj](#) (6 ĝis 16 jaraj), sed nur 8 [knabinoj](#) (8 ĝis 16-jaraj), zorgataj de 10 [eksinfanoj](#).

La [IIK-ejo](#) estas samtempe la plej pitoreska [UK-dormejo](#) (plu mendebla!)

kio ebligas ke gepatroj povas kun siaj infanetoj dormi sed iri tage al UK per rekta buso.

La nunaj [IIK-prezroj](#) plu validas ĝis la 30a de aprilo.

Respondu rekte al

[<infana.kongreseto@gmail.com>](mailto:infana.kongreseto@gmail.com)



# Plursporta Mara Ferio 2018 [Vacanze estive multisport 2018]

**LASTAJ LOKOJ DISPONEBLAJ** al “Plursporta Mara Ferio 2018” (vidu aldonitan flugfolion).



Kvin tagoj, **13-17 Aŭgusto 2018** (tuj antaŭ Itala Kongreso)..

Estas ferio por praktiki marajn sportojn kun samideanoj:

**biciklo, kanuo, boato kaj piedmarŝo.**

La loko estas Riva Trigoso, antikva fiŝistaj vilaĝeto kun granda plaĝo en Liguria (nord-okcidenta **Italio**).

**ALIĜU NUN:** <http://www.nodobandiera.it/attivita/2018/Plursporta-Mara-Ferio-2018/>

Tutamike!

## Staĝo pri tradukado ĉe KCE [Stage sulla traduzione presso il Centro Culturale Esperantista di La-Chaux-de-Fonds



Kultura Centro Esperantista disponigas du senpagajn restadojn por partopreni en la stagho pri tradukarto, 10-15 julio, gvidota de d-ino Perla Martinelli, en La Chaux-de-Fonds, nordokcidenta Svislando. Informojn donas la Kultura centro mem ĉe [kce@esperantio.net](mailto:kce@esperantio.net)

Carlo Minnaja

# Agado de UEA dum 2017 [Attività dell'Associazione Esperantista Mondiale nel 2017]

## La 6-a Afrika Kongreso de UEA



La 31-an de decembro 2016 finiĝis la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA, kiu komenciĝis la 24-an en la tanzania urbo Bunda kun 74 partoprenantoj el 14 landoj. Krom la afrikaj landoj Burundo, DR Kongo, Kenjo, Ruando, Sud-Afriko, Tanzanio, Togolando, Zambio, estis reprezentitaj ankaŭ Brazilo, Francio, Hungario, Islando, Japanio kaj Koreio.

*(revuo Esperanto Januaro paĝoj 6-7, 38-40, 89)*

## Aktivejo por aktivuloj

Universala Esperanto-Asocio  
(en oficiaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Abenu blogon per RSS

2015 [aktivulo.net](http://aktivulo.net)  
Amikumu Centra Oficejo  
DuaLingo Esperanto Interreto  
Ipermy Konekto matematiko  
MxTiran olimpiko PReVo  
statuto subtenoj TEJO  
UEA Vatikano volontala  
dama vortaroj

Hejmo » Aĝadaj Raportoj » Asocia blogo

Asocia blogo

### Esperanto. Rezultoj de 2016

Dima Docenko  
Sab, 2017-01-21 18:40

Mi volontulis en UEA en centra oficejo en Roterdamo kaj tio helpis al mi pli bone kompreni gravan kunigan rolon de UEA kaj TEJO por esperantistoj. Por entuziasmigi vin por nova jaro, mi volas listigi moĝeajn ŝanĝojn en Esperanta movado en 2016 kiuj helpis diskonigi kaj popularigi Esperanton.

Ĉi tiu listo certe ne estas plena kaj reflektas mian opinion.

### Amikumu

Komenciĝis kreado de Amikumu - apo por saĝtelefonoj kiu ebligas al esperantistoj trovi aliajn esperantistojn apude, speciale tiujn kiuj havas samajn hobiĵojn. UEA (Universala Esperanto-Asocio) estas oficiala sponsoro de Amikumu.

<http://eseonoj.na/2016/10/amikumu/>  
<http://esperanto.brazilo.org/archives/3190>

UEA lanĉis la retejon [www.aktivulo.net](http://www.aktivulo.net), kiu prezentas bazajn informojn pri pluraj aktivaĵoj. Ĝia celo estas ne nur prezenti informojn, sed ebligi komunikadon, blogon kaj aliajn interaktivajn rimedojn.

En la enira paĝo estas kolekto de ĉ. 140 komunikoj EKO, dissenditaj ĝis nun. Estas ankaŭ blogo pri agado, por ke estraranoj kaj aliaj aktivuloj povu komuniki siajn projektojn kaj atingojn kaj alvokojn. Informoj pri la AMO-programo, Jaro de la Lernanto, Ni semas kaj FLAM-analizoj.

*(revuo Esperanto Februaro paĝo 37)*



## Gazetara kampanjo por la Zamenhof-Jaro



UEA provizis novan paĝaron [www.zamenhof.life](http://www.zamenhof.life), kiu havas ampleksan enhavon pri la vivo kaj verko de Zamenhof en Esperanto kaj allogajn informojn por la ekstera publiko en pli ol 30 lingvoj.

Krom tiu plurlingva paĝaro, estas ankaŭ la paĝo [www.gazetaro.org/eventoj/](http://www.gazetaro.org/eventoj/) por kolekti kaj montri eventojn aŭ aperintajn artikolojn pri la Zamenhof-Jaro sur mapo, kalendaro kaj blogo.

La Estraro de UEA decidis ankaŭ pri speciala gazetara kampanjo okaze de la "Zamenhof-Jaro". La celo estas informi plejeble multajn gazetojn, radiostaciojn, televidstaciojn, retpaĝojn aŭ blogojn pri Zamenhof kaj Esperanto. Per la helpo de kunlaborantoj, la asocio sendis pli ol 3 mil mesaĝojn al komunikiloj en pluraj landoj.

**(revuo Esperanto Februaro paĝoj 3, 31, 55, 112, 132 )**

## Amikumu



Amikumu estas nova aplikaĵo por poŝtelefonoj. La programeto faciligas interkontaktadon de homoj, kiuj parolas samajn lingvojn, montrante ilian aktualan (proksimuman) lokan distancon de la uzanto kaj donante la eblon tekste mesaĝi al ili.

UEA estas la ĉefa sponsoro de Amikumu, kiun realigas esperantista teamo sub la gvido de Chuck Smith kaj Richard Delamore.

Ĝi estas facile rete trovebla kaj elŝutebla. Amikumu estas ekzemplo de nova iniciato sur la agadkampo Komunumo, kiu celas malfermi al esperantistoj novajn manierojn uzi la lingvon por komunaj celoj, kaj samtempe protekti kaj evoluigi niajn plej bonajn kulturajn tradiciojn. <https://amikumu.com/eo/>

**(revuo Esperanto Aprilo paĝoj 88, 111, 154-155, 213)**

## La Estraro traktis renovigojn en Roterdamo



La retejo de UEA havis gravan lokon en la tagordo de la Estrarkunsido, ĉar kreiĝis teknika teamo por zorgi pri ĝia kompleta renovigo. Tri anoj de tiu teamo, kiun gvidas Ana Ribeiro (Brazilo), venis al Roterdamo por aranĝi la lastajn detalojn de la kontrakto kaj konsiliĝi kun la Estraro pri diversaj demandoj.

Jam okazis signifa preparlaboro pri la nova datumbazo kiu fundamentos la novan sistemon, kiu integros la financon, membraran, libroservan kaj retejan administradon, ebligante pli bonkvalitajn kaj diversajn servojn al la membroj kaj ŝparante laborfortojn en la Centra Oficejo.

**(revuo Esperanto Junio paĝoj 125, 134-141, 177 )**

## La 46-a Malferma Tago de la Centra Oficejo



Por la 46-a fojo okazis Malferma Tago de la Centra Oficejo sabaton, la 29-an de aprilo 2017, kaj tuj poste, dimanĉe, la 30-an de aprilo, refoje okazis seminario pri informado.

La 46-a Malferma Tago estis dediĉita al la Zamenhof-Jaro: unue, tuj post la libroservaj novaĵoj prezentitaj de Ionel Onet, Martin Schäffer, Ĝenerala Sekretario de UEA, prezentis trarigardon pri la Zamenhof-Jaro: ĝisnunaj atingoj kaj venontaj paŝoj.

Al la Zamenhof-Jaro rilatis ankaŭ la prelego de Barbara Pietrzak, kiu, ne nur kiel komisiito de UEA pri la Zamenhof- Jaro, sed ankaŭ kiel ĵurnalisto de la Pola retRadio, regule kontribuas al la disvastigado de informoj per intervjuoj, felietonoj rilate al la Jaro.

**(revuo Esperanto Junio paĝoj 3, 31, 55, 112, 125, 132)**

UEA eldonas librojn kaj gazetojn en Esperanto, subtenas kursojn kaj kulturajn eventojn. Aliĝu nun <https://uea.org/alighoj/alighilo>

70-a IKU kaj 20-a altnivela IKU-libro kronis la sciencan programon en Seulo



Unuafoje okazinta en 1925, la Internacia Kongresa Universitato (IKU) ĉijare festis la 70-jaran jubileon. Amri Wandel, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), prezentis koncizan historion de IKU-AIS.

Okazis naŭ IKU-prelegoj, el kiuj kvar havis daŭrigajn prelegojn kiel kursojn de AIS. La plenaj resumoj de ĉiuj 13 prelegoj estas legeblaj ĉe: <http://uea.org/teko/IKU>.

Kiel en ĉiuj jaroj ekde 1997 aperis la IKU-Libro kun la tekstoj de la IKU-prelegoj kaj ĉi-jare ankaŭ resumoj de la prelegoj okazintaj kadre de la Scienca Kafejo.

**(revuo Esperanto Septembro paĝoj 173, 233)**

Unesko-Kuriero en Esperanto eldoniĝis



Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko, kiu ekaperis en 1946. Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio.


Dank' al kortuŝa kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la 1-a numero de Unesko-Kuriero en Esperanto estas eldonita.

La papera versio estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo:

[http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero\\_1-2017.pdf](http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf)

**(revuo Esperanto Septembro paĝoj 63, 83, 174, 213)**

## Unuiĝintaj Nacioj



Cesco Reale kaj Stefano Keller, el la teamo de UEA-representantoj ĉe UN en Ĝenevo, partoprenis kunsidojn de la 10-a sesio de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP), kiu okazis en la Palaco de Nacioj inter la 10-a kaj 14-a de julio 2017.

La temoj de la evento estis: raportoj kaj studo pri la pasintaj laboroj kaj rigardo antaŭen, analizo de la situacio pri la partopreno de indiĝenoj en la UN-sistemo, prezentado de bonaj ekzemploj praktikaj, celantaj la realigon de la 10-jariĝinta Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

Reale kaj Keller ekspoziciis en la kunvenejo informilojn pri Esperanto, UEA, la Zamenhof-Jaro, kaj interparolis kun indiĝenoj kaj NRO-representantoj. Krome, ili esploris pri ebloj organizi paralelan eventon ĉe UN, okaze de iu simila venonta kunsido.

Legu plu: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj>  
**(revuo Esperanto Septembro paĝoj 176, 250)**

## TEFA venko



Tutmonda Esperanto-Futbala Asocio (TEFA) anoncis, ke la teamo Esperanto venkis la korean teamon Dongdaemun (1 - 0).

Tio estas la 3-a pokalo Zamenhof kaj la unua venko de la teamo Esperanto. La futbalmatĉo okazis kadre de la 102-a Universala Kongreso en Seulo.

**(revuo Esperanto Septembro paĝo 175)**

## La 102-a Universala Kongreso en Seulo



1174 homoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj venis al Seulo, Koreio, por partopreni la 102-an Universalan Kongreson, en granda kaj agrabla kongresejo. Estis multaj da ĉarmaj koncertoj preskaŭ ĉiutage. Gravas mencii pri La Ponto-kunveno (pri unuiĝo de Koreio), kiu okazis en la Korea Parlamentejo kie ĝia vicprezidanto bonvenigis la partoprenantojn esperantistajn kaj dum kiu la oficiala lingvo estis Esperanto! Kandellumo Verda (la kongresa ĉiutaga kuriero) lumigis la ŝanĝojn kaj donis gravajn informojn. La urbestro de Seulo bonvenigis la kongresanojn dum la malfermo kaj amaso da Esperanto-flagoj estis en kelkaj stratoj ĉirkaŭ la Universitato de Fremdaj Studoj (HUFS), kie okazis la kongreso.  
**(revuo Esperanto Septembro paĝoj 171-173, 175, 178-179, 186)**

## Multkultura Vilaĝo Esperanto 2017



Aŭguste de 2017, estis realigita la duan fojon Multkultura Vilaĝo Esperanto dum la granda, fama festivalo Woodstock ĉe la pola/germana landlimo. Ĝia iniciatinto kaj kunordiganto estas CEM - Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz. La projekton monsubtenis UEA kaj bonkoruloj. La 20-persona teamo de mateno ĝis vespero laboris por informi kaj reklami pri Esperanto. Rikolto povas esti abunda, ĉar kursoj de Esperanto, gvidataj de Stano Marček 3 foje ĉiutage, allogis plenajn grupojn de entuziasmuloj, kiuj dum duhoraj lecionoj prilaboris po 6-7 lecionojn! Aldone ni kolektis deklarojn por junaj amikoj de Esperanto kaj samtempe la subskribojn por Paca Nobel-Premio al la Organizantoj de la Festivalo. La rezultoj estis - cent deklaroj de Amikoj de Esperanto kaj pli ol 2 mil subskriboj por Nobel-Premio.  
**(revuo Esperanto Oktobro paĝoj 202-203)**


## IJK Bunta kaj amikema mikso inter junuloj



Rekorde granda estis la 46-a Internacia Infana Kongreso (IJK) en Seulo, kiu okazis paralele kun la Universala Kongreso. Ĝi altiris 66 infanojn kaj adoleskantojn el ok landoj kun 12 diversnaciaj gvidantoj. El la 66 partoprenantoj, nur 15 venis el Esperanto-familioj kaj 51 el lernejoj: 4 ĉinaj infanoj el elementa lernejo, Baijangŝuijie, 4 koreaj infanoj el elementa lernejo, Susong, 7 japanaj adoleskantoj el la rondoj de la japana religio Oomoto kaj 36 koreaj adoleskantoj el 5 alternativaj lernejoj.

**(revuo Esperanto Oktobro paĝo 204)**

## UEA pledas por ne-perforto



La 2-an de oktobro, Unuiĝintaj Nacioj invitas la mondon kunsoleni la Internacian Tagon de Ne-perforto. La Tago celas disvastigi konscion pri la ne-perforta vojo al solvado de konfliktoj, inspirite de la filozofio kaj persona ekzemplo de Mahatmo Gandhi, kiu nomis la ne-perforton "la plej granda potenco je la dispono de la homaro."

En ĉi tiu tago, Universala Esperanto-Asocio deklaras sian firman subtenon por la alvoko de UN, kies aktualeco estas konfirmita ĉiutage per novaĵoj el ĉiuj kontinentoj. La principoj kaj agoj de ne-perforto respondas al la streboj de la Esperanto-movado, per la disvastigo de lingvo neŭtrale homa, kultivi pacon, toleremon kaj komprenon tutmonde. Sekve, UEA kondamnas ajnan formon de perforto, kaj substrekas ke plena respekto al la homaj rajtoj estas nemalhavebla bazo por la konstruado de kulturo orientita al paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

**(Gazetara Komuniko de UEA Oktobro N-ro 707)**

## Strategia Forumo pri Orientazia Movado kaj filmfestivalo Teo kaj Amo



La Strategia Forumo pri Orientazia Movado estas organizita de Lee Jungkee kaj ĝia celo estas kunvenigi gvidajn aktivulojn el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Mongolio por interŝanĝi ideojn kaj trovi novajn vojojn por la progresigo de Esperanto en Orienta, Centra kaj Suda Azio.

Estas notinde, ke du universitatoj en Ĉinio (Universitato Kunming-a Arta Profesia kaj Universitato Laoning) interesiĝas pri fondo de Esperantocentro en siaj universitatoj.

La festivalo Teo kaj Amo estis tre bona, kun gaja kaj internacieca etoso. Ĉion gvidis denove Ĝoja (Zhang Ping) el Ĉina Radio Internacia, kun la subteno de renoma fakulino pri teo-kulturo, profesoro Wang Xufeng. Novaĵo ĉi-foje estis la aŭspicio de la ĉefurbo de la gubernio Dushan en la sudo de la provinco Guizhou. Temas pri tre bela monteta regiono kun kelkaj lokaj indiĝenaj popoloj.

La eventojn partoprenis la prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la estrarano Lee Jungkee.

**(revuo Esperanto Decembro paĝoj 244-245)**

## Bona etoso, kultura bunto kaj laboremo



Sukcese okazis de la 13-a ĝis la 15-a de oktobro la 4-a SudAzia Seminario (SAS 4) en la suda parto de Barato (Hinda Unio), en la urbego Bengaluro. La seminario logis 54 partoprenantojn.

La malferma ceremonio estis mastrumata de d-ro Giridhar Rao. Salutis nome de UEA ĝia vic-prezidanto, Stefan MacGill. Temis ne nur pri saluto, sed ankaŭ agad-proponoj – tiu teksto disiris vaste per EKO-komuniko tuj post la malfermo. Salutis nome de ILEI ĝia prezidanto, s-ino Mirejo Grosjean, kiu skizis novajn evoluojn en la laboro de la instruista ligo.

En kvar grupoj oni diskutis kaj katalogis la movadajn fortojn kaj la problemojn de la regiono; poste la avantaĝojn kaj minacojn de la socio kaj la rezultojn reraportis al la pleno. La tuton reĝisoris la vicprezidanto de UEA. La rezulto de tiu analizo disiris al milo da retadreso per EKO-komuniko du horojn post la fino de la sesio. Post la analizo, sekvu ago-proponoj.

**(revuo Esperanto Decembro paĝo 246)**

## La 47-a Malferma Tago kaj Seminario pri Informado en la Centra Oficejo



La 47-a Malferma tago okazis la 25-an de novembro, 53 geesperantistoj el 20 landoj partoprenis. Ionel Oneț raportis pri la plej novaj novaĵoj de la Libroservo, Roman Dobrzyński faris prelegon pri la temo “Zamenhof en Varsovio”, la prelego de sinjorino Spomenka Štimec donis fokuson al Vasilij Eroŝenko, Rakoen Maertens faris raporton pri “Agadoj ĉe Unesko”, la prelega temo de Amri Wandel estis “Kosmo kaj ni: novaj perspektivoj de vivo ekstertera” kaj la temo de Marija Beloŝević estis “Verkaro de Lucija Borĉić”. La volontulinoj Fériel Djenidi kaj Roxane Romann faris prelegon kun la temo “Kara Akademio,” kaj “El Brezando ĝis Samarkando”, Hoan Tran raportis pri la agadoj de TEJO, Nicoleta Enache kaj Hoan Tran raportis pri detaloj de Varbiloj en kaj pri Esperanto, kaj Lucia Li prezentis la detalojn pri ĉiutagaj laboroj, radiaj programeroj kaj kolora enhavo de la retejo de la Esperanta Redakcio de Ĉina Radio Internacia. La sekvantan tagon okazis Seminario de Informado. Nicoleta pli profunde diskutis pri kio vere temas «informi», ĝiaj bazaj elementoj kaj pri kio informanto indas atenti dum la procezo de Informado. Kun fokusiĝo sur flugfolioj kaj faldfolioj, Roxanne donis al la aŭskultantoj interesan scion, ke desegno de varbiloj tute ne aspektas tiel simpla, kaj ŝi prezentis ekzemplojn pri tio kiel etaj desegnaĵoj povas havi grandan efikon kaj influon sur la legantoj. Posttagmeze, la dua parto de la Seminario celas ankaŭ neesperantistojn kaj ideale tiam la CO estis tute malfermita al la publiko.

Vi povas spekti la eventon ĉe: <https://www.youtube.com/user/UEAviva/videos>  
(*revuo Esperanto* **Januaro 2018** paĝo 5)



# AMO en 2017

N	Loko	M	T	H/T	~PP	Gvid	Temo
30	Munkeno, DE	mar	8	8	15	3	Trejnado por Trejnistoj
31	Kutaisi, GE *	apr	3	3	25	6	Esperanto en la Seminaria Regiono
32	Bergamo, IT	apr	8	10	17	5	Trejnado por Trejnistoj
33	Greziljono, FR	apr	4	5	12	4	Kiel modernigi la instruadojn per novaj teknikajoj
34	Wroclaw, PL	maj	2	2	12	1	La rolo de denaskaj esperantistoj
35	Les Brenets, CH*	maj	4	6	20	4	Atente al Instruado kaj la Jaro de la Lernanto
36	Teruelo, ES	jun	2	6	50	10	Utiligo de la Zamenhof-Jaro kiel rimedo por ekstera informado kaj interna trejnado
37	Raleigh, US	jul	8	3	50	2	Preparo kaj redaktado de son-dokumentoj
38	Busan, KR*	jul	3	4	20	5	Intensigo de Instruista Trejnado
39	Bengaluru, IN*	okt	3	4	38	6	Evoluigo de la Esperanto-movado en la suda Azio
40	Moskvo, RU*	dec	1	6	25	3	Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amaskomunikiloj, interreto
41	Parizo, FR	dec	1	8	20	--	Eksterarilata agado ĉe Unesko: spertoj kaj konsiloj por efika reprezentado
<b>Σ12</b>							

\* Novaj landoj por AMO.

N: Numero seria. Loko: Landkodoj laŭ ISO-normoj (JL 2017, p. 267).  
M: Monato.

T: Nombro da tagoj kun seminaria programo.  
H/T: Nombro da horoj ĉiutage en plen-programaj tagoj.

= PP: Proksimuma nombro da partoprenintoj.  
Gvid.: Nombro da gvidantoj inkluzive de kunordiganto, se tiu (kun)gvidis sesion.

Kun sama intenseco kiel en la antaŭa jaro pluiras la trejnprogramo de UEA. Temas pri Aktivula Maturigo, konata (kaj klare amata) laŭ la mallongigo AMO. Tra 2016 kaj 2017 okazis statistike unu trejnseminario ĉiumonate, pro la senĉesa deziro venanta el plej diversaj mondpartoj.

Depost la lanĉo en marto 2014, okazis laŭjare 8, 9, 12 kaj 12 seminarioj, do fine de 2017 okazis jam 41 el ili. En 2017 la programo atingis kvin novajn landojn: Baraton (Hindan Union), Kartvelion, Korean Respublikon, Rusion kaj Svislandon. La programo tuj post la lanĉo atingis ekstreman geografian varion: la unuaj kvar seminarioj okazis en Eŭropo, Norda Ameriko, Suda Ameriko kaj Azio.

Spite la malfacilan financon de UEA, la programo pri trejnado eniras sian kvaran jaron kun fido pri senĉesa deziro je seminarioj, kun promeso de pliaj novaj landoj, mondpartoj kaj temo - la jaro 2018 devos enhavi la kvindekan seminarion.

**(revuo Esperanto Januaro 2018 paĝoj 6,7)**

Reprezentanto de UEA alparolis la plenan sesion de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko



La 6-an de novembro 2017, reprezentanto de UEA faris triminutan paroladon antaŭ dumilo da diplomatoj, aktivuloj kaj oficistoj el la tuta mondo, en la plena sesio de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazanta ĉe la sidejo de Unesko en Parizo. Nur dudeko da internaciaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj) ricevis tian lokon en la tagordo.

La voĉo kaj la vizaĝo de UEA estis tiuj de Rakoen Maertens, juna aktivulo el Belgio kaj komisiito de TEJO pri agado ĉe Unesko, kiu jam akiris spertojn pri eksteraj rilatoj en pluraj internaciaj aranĝoj inkluzive, de NRO-Forumo de Unesko okazinta pasintmaje en Riado, Sauda Arabio. Subtenanta lin estis teamo konsistanta el Renée Triolle, François Lo Jacomo, Barbara Despiney, Didier Loison kaj Gilles Tabard.

Eblas spekti la paroladon ĉe <https://youtu.be/BhyjClzFi3I>  
(revuo *Esperanto* Januaro 2018 paĝoj 10-13)

## Unesko subtenis la klimakson de la Zamenhof-jaro



En la 11-a de decembro okazis la konferenco “Tutmondiĝo, Interreto, Unesko-Kuriero”, kun la subtemo “Kiel status Esperanto 100 jarojn post la morto de Zamenhof?” en la monda sidejo de Unesko en Parizo en ĝia plej granda festo-salono.

En la malferma ceremonio unue salutis la estrino de la pola delegacio al Unesko, s-ino Krystyna Żurek, sekvate de Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, la pranepino de L.L. Zamenhof, kaj s-ro Frank La Rue, la Asista Direktoro de Unesko por Komunikado kaj Informado.

Fine salutis Stefan MacGill nome de UEA. La programon prezidis s-ino Renée Triolle kaj la tuto estis simultane interpretita inter Esperanto kaj la angla kaj la franca.

Okazis ankaŭ aliaj gravaj paroladoj; Sebastien Moret: “Kial Esperanto venkis”. Jean-Claude Lescure: “Esperanto fronte al tutmondiĝo”. Guilherme Fians: “Esperanto nuntempe kaj fronte al sia estonto: komunumo kaj siaj komunikiloj”. Chuck Smith: “La modernaj komunikiloj serve al Esperanto”. Trezoro Huang Yinbao: “La Unesko-Kuriero en Esperanto”. Giorgio Novello: “Ĉu nova lingvo por Unesko?”

Por profiti la fluon de esperantistoj el diversaj landoj, Espéranto-France kaj UEA kune organizis en la antaŭa tago la 41-an AMO-seminarion, kiu unuafoje traktis temon pri la eksteraj rilatoj de UEA, unuavice la rilatoj kun Unesko. En la tago post la konferenco okazis tre pozitiva kunsido inter Esperanta delegacio kaj la ĉefredaktoro de la Unesko-Kuriero, kiu bonvenigis la ekaperon de la Kuriero en Esperanto.

Entute, valora rekono de Unesko pri la aktiveco kaj lojaleco de la esperantistaro en la antaŭenigo de la celaro kaj principoj, kiujn dividas UEA kaj Unesko.

**(revuo Esperanto Februaro 2018 paĝoj 37-39)**

UN-Reprezentanto de UEA alparolis la tradukan servon de Unuiĝintaj Nacioj



La 24-an de majo la reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, d-ro Humphrey Tonkin, prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri “La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN”. Lia prelego emfazis, ke la oficistoj de UN, ekster la lingvaj servoj, emas subtaksi la gravecon de lingvoj ne nur ene de la strukturoj de UN sed ankaŭ en la programo de internacia evoluigo.

Li atentigis pri la fakto, ke lingvoj entute ne menciigas inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, nek inter la 169 “celtabuloj” kiuj akompanas ilin.

Aliflanke, li notis, ke en UN kreskas la interesiĝo pri multlingvismo. En majo, rezolucio de la Ĝenerala Asembleo kreis novan Internacian Tagon de Tradukado, kiun oni festos ĉiujare la 30-an de septembro; kaj nova rezolucio pri multlingvismo, akceptita de la Ĝenerala Asembleo kaj baldaŭ aperonta en sia fina formo, emfazas la gravecon de dialogo en la daŭrigeblo de la agado de UN, kaj atentigas pri la valoro de scipovo kaj utiligo ankaŭ de lokaj lingvoj, aldone al la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo.

D-ro Tonkin estis invitita kiel fakulo pri lingvaj demandoj - rekono samtempe de la rolo de UEA en la stimulado de serioza kaj realisma debatado pri la lingva politiko de UN, kaj de nur flanka pritrakto de la pretendoj specife de Esperanto.

**(revuo Esperanto Decembro paĝo 250)**

# Pillole di Salvezza 0964: Miramar

Continua la rubrica dedicata ad **Antonio De Salvo**: proponiamo ai lettori un articolo estratto dal suo blog **Esperanto-vivo** (ospitato nella *Bitoteko*) che l'Instancabile sta costruendo pazientemente giorno per giorno.

In questo numero:

## Miramar

Il 14 aprile 1864 Ferdinando Massimiliano d'Asburgo (1832-1867), principe imperiale, arciduca d'Austria, principe di Ungheria e di Boemia

[it.wikipedia.org/wiki/Massimiliano\\_I\\_del\\_Messico](https://it.wikipedia.org/wiki/Massimiliano_I_del_Messico)

[eo.wikipedia.org/wiki/Maksimiliano\\_%28Meksiko%29](https://eo.wikipedia.org/wiki/Maksimiliano_%28Meksiko%29)

partì da Trieste, lasciando il castello di Miramare ("Miramar" in triestino)

[it.wikipedia.org/wiki/Castello\\_di\\_Miramare](https://it.wikipedia.org/wiki/Castello_di_Miramare)

alla volta del Messico, di cui era stato nominato imperatore con l'appoggio di Napoleone III di Francia e di gruppi conservatori messicani.

La fregata che lo portava in Messico (insieme con la moglie Carlotta) recava il nome "Novara": un tipico esempio di come la storia abbia almeno due facce, dato che per gli italiani il nome della città di Novara ricorda una pesante sconfitta

[it.wikipedia.org/wiki/Battaglia\\_di\\_Novara\\_%281849%29](https://it.wikipedia.org/wiki/Battaglia_di_Novara_%281849%29)

[eo.wikipedia.org/wiki/Batalo\\_de\\_Novaro\\_\(1849\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Batalo_de_Novaro_(1849))

mentre per gli austriaci, specularmente, ricorda una grande vittoria.

In Messico, Massimiliano incontrò un forte resistenza, e ad un certo momento fu abbandonato dai conservatori messicani (a causa della sua politica liberale), dalla Francia e dagli Stati Uniti (che applicarono la c.d. "Dottrina Monroe"

[it.wikipedia.org/wiki/Dottrina\\_Monroe](https://it.wikipedia.org/wiki/Dottrina_Monroe)

[eo.wikipedia.org/wiki/Doktrino\\_de\\_Monroe](https://eo.wikipedia.org/wiki/Doktrino_de_Monroe)

secondo cui nessun Paese extra-americano ha diritto di intromettersi negli affari americani, mentre gli Stati Uniti hanno il diritto, ed anzi la missione, di occuparsi dell'intero continente).

Carlotta tornò in Europa, cercando appoggi per il marito a Parigi, Vienna (presso l'imperatore Franz Josef/Francesco Giuseppe, che però era lietissimo di essersi liberato del fratello) e Roma (presso Papa Pio IX), ma i suoi sforzi furono vani, e non rientrò in Messico, anche perché colta da infermità mentale; morì in tarda età, nel 1927, in Belgio sua patria.

Massimiliano, catturato dagli insorti di Benito Juárez

[it.wikipedia.org/wiki/Benito\\_Ju%C3%A1rez](https://it.wikipedia.org/wiki/Benito_Ju%C3%A1rez)

[eo.wikipedia.org/wiki/Benito\\_Ju%C3%A1rez](https://eo.wikipedia.org/wiki/Benito_Ju%C3%A1rez)

(nel 1883, il padre socialista di Benito Mussolini chiamò il figlio Benito - che, curiosamente, significa "Benedetto" sia in spagnolo che in Esperanto - proprio in omaggio al leader rivoluzionario messicano), fu fucilato a Queretaro il 19 giugno 1867. Il suo corpo fu imbalsamato, e l'anno successivo fu riportato a Trieste, con la stessa nave "Novara" che l'aveva portato in Messico; trasportato a Vienna, fu sepolto nella Cripta Imperiale.

La tragica vicenda di Massimiliano e Carlotta - vista sotto l'aspetto della nemesi storica, quasi vendetta sugli incolpevoli Massimiliano e Carlotta per la battaglia di Novara e la distruzione della civiltà azteca - ha formato oggetto di una famosa poesia di Giosuè Carducci, "Miramar", di cui unisco la bella traduzione in Esperanto di

Pier Giorgio Soranzo, da "L'Esperanto" 1981-1 (il testo italiano può essere letto su [it.wikisource.org/wiki/Odi\\_barbare/Delle\\_Odi\\_Barbare\\_Libro\\_I/Miramar](http://it.wikisource.org/wiki/Odi_barbare/Delle_Odi_Barbare_Libro_I/Miramar)).

Aggiungo che, a Trieste, la sfortunata vicenda di Massimiliano e Carlotta è ancora vivissima nel ricordo, tanto che nei pressi del castello di Miramare esiste la "Riva Massimiliano e Carlotta",

[www.mapquest.com/italy/friuli-venezia-giulia/trieste/34151/riva-massimiliano-e-carlotta-45.707459,13.713687](http://www.mapquest.com/italy/friuli-venezia-giulia/trieste/34151/riva-massimiliano-e-carlotta-45.707459,13.713687)

mentre nella toponomastica della città, profondamente italianizzata dopo l'unione all'Italia nel 1919, nemmeno un vicolo è dedicato all'imperatrice Maria Teresa d'Austria

[it.wikipedia.org/wiki/Maria\\_Teresa\\_d'Austria](http://it.wikipedia.org/wiki/Maria_Teresa_d'Austria)

[eo.wikipedia.org/wiki/Maria\\_Tereza\\_de\\_A%C5%ADstrio](http://eo.wikipedia.org/wiki/Maria_Tereza_de_A%C5%ADstrio)

sebbene essa abbia fatto la fortuna di Trieste.

Sempre a Trieste, in estate si svolge nel castello di Miramare uno spettacolo di suoni e luci dedicato a Massimiliano e Carlotta.

Allego:

- la busta primo giorno (FDC) del francobollo messicano del 1980 per i monumenti preispanici del Messico;
- una cartolina maximum, formata con un francobollo italiano del 1980 per il Castello di Miramare a Trieste;
- la copertina di un opuscolo in Esperanto su Miramare, di Livio Fioroni.

---

## MIRAMARO

Ho Miramar', al viaj blankaj turoj  
ĉagreniĝintaj pro l' ĉiel' plennuba,  
dense kaj kiel birdoflug' sinistra  
venas la nuboj.

Ho Miramaro, kontraŭ viajn rokojn  
suprenvenante de l' tempesta maro  
grize kaj grumble kiel gent' kolera  
plaŭdas la ondoj.

Spektas la golfojn turohavaj urboj  
kiuj malĝojas sub la ombr' de l' nuboj:  
estas Piran', Parenzo, Eĝid', Muĝjo,  
gemoj de l' maro.

Puŝas la maro muĝan ondkoleron  
kontraŭ ci klifan bastionon: ambaŭ  
bordojn adriaajn vi el ĝi ampleksas,  
turo habsburga.

Tondras ĉielo super Nebrezin' kaj  
longe de l' rustkolora bord', Triesto,  
fone, la kapon fulmkronitan levas  
super nimbusojn.

Kiel ridetis ĉio, tiun dolĉan  
tagon aprilan, kiam kun l' edzino  
bela, veturis sur la mar' la blonda  
imperiestro!

Lia vizaĝ' serena elradiis  
fortan potencon imperian: dume  
pave l' okul' lazura de l' virino  
iris la maron.

Reĝa kastel', adiaŭ, nest' de amo  
vane farita por feliĉaj tagoj!  
Sur ocean' dezerta Fat' alia  
trenas la paron,

kiu forlasas kun espero arda  
ĉambrojn pentritajn per triumfoj, riĉajn  
je aforismoj. Dant', Goet' parolas  
vane al reĝo

el instigantaj bildoj: sfinks' lin logas  
varimiene sur la mar'. Li cedas:  
restas ovrita je duon' la libro  
de l' romancero.

En Hispani' azteka lin akceptos  
nek aventuroj nek priamaj kantoj  
nek la gitaraj sonoj. Kiu fora  
kanto funebra

venas aere de la malfeliĉa  
pint' de Salvor' tra l' raŭka plor' de l' ondoj?  
Ĉu de Istri' l' feinoj oldaj kantas,  
ĉu la venetoj

jam forpasintaj? Aj! Senŝance sulkas  
vi, Habsburgido, nian maron sur fa-  
tala Novar'. Eskortas vin Furi': al  
vent' ŝi la velon

hisas. Rigardu l' sfinkson ŝanĝmienen  
retroirantan antaŭ vi kun trompo!  
Kontraŭ l' edzino via blankas pale  
Janjo freneza.

Jen la krani' senkorpa kontraŭ vi rikani  
de Antoneta. Putrokule  
vin la vizaĝo hirta, flava fiksas

de Montezumo.

En la arbaroj el agavoj altaj  
kiujn bonfara vent' neniam blovis,  
en piramido loĝas, eligante  
fajrojn malhelajn

tra la tenebroj de l' tropiko, dio  
Huitzilopotli, kiu vian sangon  
flaras kaj per l' okul' tra l' mar' irante  
"Venu - ululas -

"Jen vi, finfine! La blankul' fera  
templojn kaj regnon mian fordetrus;  
venu, viktimo destinita, nep' de  
Karlo la kvina.

Viajn malnoblajn avojn forputrantajn  
lante aŭ ardajn pro manio reĝa  
mi ja ne volis: vin mi ŝiras, fresa  
flor' de Habsburgo.

Vin foroferos mi al grandanima  
Ĝuatimozin' de l' volb' ĉiela reĝo,  
kiel viktimon, pura, forta, bela  
Maksimiljano".

Giosuè Carducci, trad. Pier Giorgio Soranzo  
("L'Esperanto" 1981-1, p.6-7)





*La Kastelo de*  
**MIRAMARE**